

V-18921/10

Vol. 10-a

N-ro 4-a (40-a)

I-IV-1959

SCIENCA

REVUO

★ ★

Sendependa revuo

Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.)

ELDONO DE J. MUUSSES PURMEREND NEDERLANDO

SCIENCA REVUO

volas

- (1) subteni la ĝeneralan sciencan nivelon de sia legantaro, pri ĉiaj temoj;
- (2) helpi al la fratiĝo de la homoj, libere diskutigante pri la disigaj konceptoj laŭ sciencaj normoj;
- (3) science studi la problemojn de la Esperantismo;
- (4) evoluigi la lingvon laŭ sciencaj bezonoj, surbaze de la principo de sufiĉo kaj neceso.

Por tiu celo ĝi bezonas ne nur redakcion kaj legantojn, sed ankaŭ verkantojn.

D-ro W. Manders

INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

ENHAVO

Interlingvistika parto

Capitro I	<i>La interlingvistiko kaj Esperanto.</i>
Capitro II	<i>La naturalismo de Edgar de Wahl kaj Otto Jespersen.</i>
Capitro III	<i>La naturalismo de IALA.</i>

Esperantologia parto

Capitro IV	<i>Taskoj de la esperantologio.</i>
Capitro V	<i>La evoluo de Esperanto. Lingva korekteco.</i>
Capitro VI	<i>Kompara esperantologio.</i>

prezo 2.25 Ned. guld. / £ —.5.— / \$ —.75

J. M U U S S E S - E L D O N I S T O

Purmerend - Nederlando

SCIENCA REVUO

ELDONO DE J. MUUSSES PURMEREND NEDERLANDO

Sendependa revuo. Aperas kvarfoje jare. Ab. pr. 30 steloj; 7.50 Ned.gld.; § 2.20.
Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.)

Redaktoro: D-ro W. P. Roelofs, Kerkpad zz 75, Soest, Nederlando. **Kunredaktoro kaj Re-**
prezentanto por I.S.A.E.: G. F. Makink, Eekhoornlaan 10, Bennekom, Nederlando. **Admini-**
stracia adreso por abonantoj, kiuj ne estas membroj de I.S.A.E.: J. Muusses, Purmerend,
Nederlando, Gironumero 15062 - **Sekretario de I.S.A.E.:** Prof. D-ro B. Popović, Zagrebačka 20a,
Sarajevo, Jugoslavio.

ENHAVO:	paĝo
Kiu estas Kiu en la Esperanto-movado?	145
Internacia lingvonormigo en scienco kaj tekniko. Esperanto aŭ In- terlingua? — <i>R. Haferkorn</i>	146
Recenzoj kaj Bibliografio	150
Esperanta Antologio (Redaktoro: <i>William Auld</i>). — <i>W. P. R.</i> ...	150
Indeksoj (Vol. 9 kaj 10)	152
Indekso de personoj	152
Indekso de temoj kaj terminoj	156

92(058.7) = 089.2

KIU ESTAS KIU EN LA ESPERANTO-MOVADO?

Stranga titolo, ĉu ne? Kiu konas kiun en la Esperanto-Movado? Fakte centfoje ripetiganta estas, ke la scio pri tiu aŭ alia persono (ni intence evitas la vorton *eminentulo*, tro uzitan ĝis nun!) inter niaj aktivuloj estas minima, se ne nula. Pri mortintoj oni ĝenerale povas esti indulgema: ja la kvara generacio de nia esperantista familio vere ne povas koni ĉiujn, kiuj esperis, laboris kaj iris la vojon de ĉio tera. Sed la afero estas tute alia pri la *nunaj aktivuloj* — sur pli alta ebenaĵo —. Ilin oni konu pli vaste kaj precize ol nur laŭ nomo, hejmlando kaj signifa esperantisteco. Eĉ se koncize, oni devas ilin koni iom detale, kaj fidine.

Por forigi tiun evidentan mankon en nia dokumenta literaturo, la eldonisto J. Régulo Pérez, per la konataj serioj popularigitaj sub la nomo **Stafeto**, prenis sur sin la taskon eldoni libron kun la supra titolo (laŭ la multe uzata *Who is Who?*: ekonomia-politika-diplomata eldonaĵo). La *Kiu estas Kiu?* esperantista celas doni koncizajn sed fidindajn informojn pri pasintaj pioniroj kaj nuntempaj aktivuloj, kiuj iel koinde kontribuis al nia Movado. La skemo estas proksimume jena:

Nomo(j) — antaŭnomo(j), eventuale pseŭdonimo(j).

Dato (tago, monato, jaro) kaj loko de naskiĝo, ev. de morto.

Studo(j), ev. ankaŭ ŝatokupo(j).

Civila kariero, laboro, kutimaj okupiĝoj.

Agado por Esperanto, kun precizaj indikoj pri lokoj, jaroj ktp.

Verkaro, kun indiko de kompleta titolo de la pecoj, loko kaj jaro de eldono, ev. numero de eldonoj de ĉiu peco kun pli ol unu.

Notindaj apartaĵoj aŭ aldonajoj.

Ĉio en konciza, telegrafa, leksikona maniero, sed sufiĉe klare, por eviti denovan enketon pro dubaj punktoj. La tekston, ĉe plej konataj gravuloj, akompanu bona pasportformata bildo por ornami la biografiaĵon.

Redaktas la libron la estinta Direktoro de UEA S-ro Hans Jakob, Palais Wilson, Genève, Svislando. La Estraro de UEA rajtigis lin uzi la riĉan materialon de la UEA-Biblioteko en Genevo; plie la redaktoro disponas ampleksan dokumentaron el la redakcio de la *Enciklopedio de Esperanto*.

Temas pri kolektiva verko kaj la bonvolan kunhelpon de ĉiuj ni insiste petas kaj tre dankas. Ideojn kaj konsilojn plezure ricevos la redaktoro. Antaŭvideble la libro devas esti finredaktita kaj prestaŭge tajpita frue en 1960 (sub la kutima rezervo, bone komprenita).

413.164 : 389.6(100) : 408.92

INTERNACIA LINGVONORMIGO EN SCIENCO KAJ TEKNIKO. ESPERANTO AŬ INTERLINGUA?

de R. HAFERKORN

D-ro tekn. Eugen Wüster, aŭtoro de la bonkonata verko „*Internacia lingvonormigo en la tekniko*” aperinta dum 1932 en la eldonejo de „*Verein deutscher Ingenieure*” en Berlino, denove pritraktis tiun problemon en artikolo kiu aperis en la germana lingvosciencia revuo „*Sprachforum*” (1-a jarkolekto (1955), n-ro 1-a). Simila artikolo de W. aperis ankaŭ en la franca revuo „*Arts et Métiers*”.

Ĉar kelkaj tezoj kiujn enhavas tiuj artikoloj, kaŭzis multe da miskompreno kaj miro kaj tial proteston ĉe la esperantistaj inĝenieroj kaj scienculoj, la verkinto de ĉi tiuj linioj entreprenis klarigi tiun miskomprenon jam en artikolo aperinta en Sc. Rev. 8 31-34, kaj D-ro Roelofs aldonis pluan klarigon sur p. 34-36 en sia recenzo pri la artikolo „*Technische Sprachnormung*” de d-ro Wüster.

Konsidere al la graveco de la pritraktita temo mi emas ne neglekti la aferon prezentante ĝin al la *kunsidoj de la 43-a U.K. en Mainz* en formo de jena resumo.

En la citita artikolo Wüster unue priskribas la organizon kaj la historian evoluon. Li skribas: „La internacia teknika lingvonormigo estas organizata ĉefe de la Internacia Normiga Organizaĵo (*Int. Org. for Standardization*, mll. ISO).

ISO estas la tegmenta federacio de la naciaj normigaj organizaĵoj. Ĝi fondis en 1952 apartan „Teknikan Komitato”. Tiu ĉi nomiĝas ISO/TC 37 „Terminologio”. La Aŭstria Normiga Komisiono (ÖNA) havas la funkcion de sekretario de ĉi tiu komitato.

La plej grava finita verko en la kampo de la internacia teknika lingvonormigo estas la plurlingva difinvortaro de la Internacia Elektroteknika Komisiono (IEC). IEC nun estas sekcio de ISO.

De antaŭ kelkaj jaroj ankaŭ UNESKO klopodas helpi la internacian laboron terminologian, nome per publikigado de fakvortaroj kaj subtenado de la vortara programo de la *Union des Associations Techniques Internationales* - UATI. Ĝis Majo 1953 jam aperis 24 plurlingvaj fakvortaroj, ĉe kies preparado kunhelpis la naturscienca sekcio de UNESKO.

Tiuj vortaroj kiuj estas ellaboritaj laŭ la direktivoj de Unesko, nur pere servas al la normigo. Nome tio validas, ĉar Unesko rekomendas marki en la fakvortaroj la normigitajn terminojn kiel tiajn.

Por la lingvo la plej grava aĵo ne estas la ekstera formo de la terminoj, sed la *sistemo de nocioj* sur kiu ĝi baziĝas. Estas neeble, ĝuste normigi *terminojn*, se oni antaŭe aŭ samtempe ne metas ĉiujn parencajn *nociojn* en unu sistemon. Tial ankaŭ estas utile unue konsideri la nocion, kiam oni fiksas regulojn por terminoj. Tio signifas ke la difinoj estas pritraktendaj antaŭ ol oni fiksas la terminojn. Ofte difinoj estas mallongigataj por fariĝi terminoj. — Tio validis por la normigo interne de kiu ajn nacia lingvo.

Sur la interne normigitaj terminoj nacilingvaj baziĝas la internacia interegaligo de la fakaj terminoj. Tio fariĝas laŭ jena vico:

(1) **Interegaligo de la nocioj.** — Kiu aŭdas ion pri internacia normigo de terminologio, plej ofte opinias, ke tio nur estu nomo por la enkonduko de fremdvortoj aŭ artefaritaj vortoj. — Efektive tamen la plej urĝa tasko de la internacia normigo faklingva konsistas el la interegaligo de la *nocioj* kaj nocisistemoj. La IEC-Vortaro ekz-e prezentas multajn ekzemplojn de tia interegaligo de nocioj.

(2) **Interegaligo de la semantika (= interna) formo.** — Dualoke la internacia lingvonormigo estas interegaligo de la „interna formo” de la terminoj. La granda plimulto de la terminoj ne estas simplaj vortoj uzataj en sia fundamenta signifo, sed vortkunmetaĵoj kaj nocimetajforoj (vortoj uzataj *metafore* aŭ laŭ *figura senco*). La *laŭvorta fundamenta signifo* de tiaj terminoj estas tio, kion oni nomas la „internan” (aŭ ankaŭ „semantikan”) formon de termino. La interegaligo de ĉi tiu interna formo konsistas do en „*pruntotraduko*”.¹⁾

1) La kursivaĵoj estas ekzemploj de pruntotradukoj:

Gr: peristasis	→	L: <i>circumstantia</i>	→	$\left\{ \begin{array}{l} \text{A: circumstance} \\ \text{F: circonstance} \\ \text{G: Umstand} \\ \text{Ned:} \\ \text{Omstandigheid} \end{array} \right\}$	→	E: cir- stanco (= ĉirkaŭ- staraĵo)
----------------	---	-------------------------	---	--	---	---

(3) **Interegalo de la ekstera formo.** — Sendispute en plej lasta vico — tiel laŭ la amplekso, kiel ankaŭ laŭ la graveco — staras la interegalo de la ekstera formo de la terminoj, t.e. de ilia sonformo aŭ ilia skribformo. — Gravan kontribuajon al ĉi tiu parta tasko prezentas la *Interlingua-vortaro*, kiu en 1951 estis publikigata kiel rezultajo de la jardeka esploralaboro de la *International Auxiliary Language Association* (IALA) en Novjorko. Ĉi tiu vortaro estas konata precipe sub la nomo IALA-vortaro.

Kiam en 1936 la Teknika Komitato ISA 37 „Terminologio” komencis okupiĝi pri la demando de la internaciaj terminoj, la reprezentantaj de pluraj landoj opiniis ke la solvo konsistu en „kodaj vortoj”, kiuj estu formataj en simila maniero kiel Esperanto-vortoj. Jam post mallonga tempo tamen evidentiĝis ke tia solvo kaŭzas preskaŭ unuaniman reziston de la normigaj fakuloj. Kaj tion pro tio, ĉar esperantaj vortoj kiel *konus/o*, *konus/a*, *konus/eco* malproksimiĝas nenecese rimarkinde de la jam internaciaj formoj „*cone*, *Konus*”, „*conic*, *konisch*”, „*conicity*, *Konizität*”. — La debatoj de la lastaj antaŭmilitaj jaroj montris ĉiam pli klare, ke por la celoj de la internacia terminarnormigo io alia necesas: nome speco de terminologia ŝlosilo, kiu elprenas el la ekzistantaj internaciaj fakvortoj la esencajn erojn tiamaniere, ke povas esti gajnataj el ili per inter- kaj eksterpolado laŭvole multaj neologismoj laŭstilaj. La sistemo de la IALA tre proksimiĝas al ĉi tiu celo.” — Tio estis la klarigo de W ü s t e r.

Ĝis tie la pensoj-sekvo de E. W ü s t e r ankoraŭ estas tolerebla por ni Esperantistoj, sed kion W ü s t e r aldonas en la nun sekvantaj frazoj, vokas nian unuaniman proteston: „La vortoj *cono*, *con/ic*, *con/ic-itate* ekz-e ĉiu ajn komprenas; ili estas formitaj laŭ simplaj, antaŭkonataj reguloj el antaŭkonataj elementoj. Ĉi tiaj formoj estas transigeblaj laŭ ĉie konataj reguloj en ĉiun nacilingvon, kaj inverse.” — Ankaŭ en la franca fakrevuo „*Arts et Métiers*” W ü s t e r publikigis similan prijuĝon de la afero. S-ano Ing. F. Ch a r l e t (Mézières) protestis al la revuo, skribante ke Esperanto pruvis multfoje sian taŭgecon por ĉiuj internaciaj rilatoj; oni ne povu diri ke grandskala sincera provo de ĝia uzo fiaskis! Ĉar W ü s t e r en tiu artikolo diris „Esperanto prezentas la internaciajn terminojn sub formo ofte nere-konebla por neesperantistoj — ekz-e: „*internaciigo*” por „*internationalisation*””, Ch a r l e t prave replikis jene: „Estas strange postuli ke ĉiuj komprenu sen minimuma lernado; ke Esperanto, per sia sistemo de vortfarado, kaj sia simpla gramatiko, ebligas plej facile esprimi ĉiun ideon; ke ekz-e oni trovas tiun sufikson „*ig*” ankaŭ en „*varmigo*”, en „*funkciigo*”, kies tradukoj en la diversaj lingvoj malsimilas: tio montras la superecon de nia logika Esperanto.”

Tamen estas fakto ke la plimulto de la fak-organizaĵoj tutmondaj,

kaj precipe la normigaj fakuloj en ISO kaj Unesko inklina al la metodo de *Interlingua* kaj de la *IALA-Vortaro*, ne al *Esperanto*. La kialo evidentiĝas el jena alineo de W ŭ s t e r: „Devas esti precipe emfazate, ke la esplorrezultoj fiksitaj en la *IALA-Vortaro* nepre ne limiĝas al la ekstera formo de la terminoj, sed ke ankaŭ estas zorge pritraktita la semantika flanko. Ekz-e oni ekzamenis, kiuj el la ekzistantaj signifoj estas konsiderindaj kiel internaciaj.” — La verkintoj de la *IALA-Vortaro* preferis la esploron de *etimologia deveno* de la bazaj terminoj. Tial ili venis ofte al alia rezultato kiel Z a m e n h o f en sia „*Universala Vortaro*”. Sed pri tio nur poste!

En sia letero de la 7/10/'55 al la subskribinto D-ro W ŭ s t e r klarigis la problemon denove pli detale: „Ĉe la interegaligo de la ekstera formo de la naciaj fakesprimoj (precipe de la latin- kaj grekdevenaj) la komuna etimologio estas fundamente grava. Ĝi povas esti prezentata evidente per lingvohistorie ĝuste formitaj „normformoj”, kiuj estas kiel eble plej multe liberigitaj de naciaj proprecoj. La esprimon „normformo” tie estu komprenata analoge al la esprimo „normformo de ekvacio”. Simile okazas delonge en lingvohistoriaj verkoj, ekz-e per la rekonstruado de popollatinaj aŭ mezolatinaj formoj. — Terminaroj de ĉi tiu speco estas taŭgaj por fariĝi la bazo por la nacilingvaj formoj de internaciaj fakesprimoj. Modelojn por ĉi tiu metodo oni trovas abunde. Ankaŭ por la fakaj terminoj de Esperanto tiaj terminaroj devas esti la etimologia bazo („2-ŝtupa metodo”). Ankaŭ ĝis nun estis kutime tion fari. — Male estas laŭprincipe neeble, inversigi ĉi tiun procedon, nome derivi naciajn esprimojn (de la eksteraj formoj) el la esperantlingvaj vortoj. Kaj tion pro la tro eta etimologia parenceco de la derivsistemo de Esperanto kaj pro la ofte arbitra ŝanĝo de la vortradikoj en Esperanto. Laŭ la opinio de neesperantistaj fakuloj la esperantaj „kodo-vortoj” laŭ sia ekstera formo tro devias de la grek-latinaj formoj uzataj en multaj lingvoj.” (Se Zamenhof tiel agadis, li do havis certajn motivojn por fari tion. R. H.)

En la menciita letero W ŭ s t e r tiam konkludas ke temas pri du problemoj tute apartaj unu de la alia: unuaflanke la kreado de internacia lingvo por la ĉiutaga interkompreniĝo de la homaro — li ne dubas ke Esperanto tiurilate estas la plej taŭga — kaj duaflanke la interegaligo de la ekstera formo de la naciaj fakterminoj. W ŭ s t e r diris: „Se oni intermiksas la du problemojn, tiam tio malhelpas solvi ambaŭ problemojn. Mi ne povas tute senkulpigi min pro tio, ke mi nebuligis en miaj publikigaĵoj antaŭ kelkaj jardekoj ĉi tiun distigon. Depost tio mi fariĝis pli riĉa je 25-jara lingvo-interegaligo kaj lingvonormigo.”

W ŭ s t e r plu skribis: „Mi scias ke la esperantistaro plej ofte ne pripensadis ĝis nun pri la *interlimigo de tiuj du problemoj*. Kelkaj espe-

rantistoj eble ankaŭ rifuzus la dudividon de la problemo, verŝajne pro iu instinkta malpacienco. — Pro tio mi jam kelkajn jarojn antaŭ la milito petis taŭgegajn reprezentantojn de la esperantistaj inĝenieroj, ne ĉiam rigardi min kiel reprezentanton de Esperanto en la IEC kaj en la ISA, sed anstataŭ tio enigi personojn de ilia elekto. Tio tiam ankaŭ fariĝis en la IEC kaj parte en la ISA. — En la ISO ekzistas principe du ebloj por la persona reprezentado de iuj ajn starpunktoj: per nacia normiga komisiono (kun voĉdonrajto), aŭ per internacia organizaĵo (kiel observanto, t.s. sen voĉdonrajto). Se la esperantistoj volas iri la unuan vojon, tiam ili devas provi, gajni nacian normigan komisionon por sia starpunkto. En la dua kazo internacia organizaĵo devas peti aliron ĉe la ĝenerala sekretario de la ISO.”

La tempo urĝas ke ni, Esperantistoj, enpenetru en tiujn internaciajn fak-organizaĵojn. Pro tio la menciita konsilo de W ŭ s t e r estu pridiskutata en la kongresaj kunsidoj de ISAE kaj de la AKADEMIO.

Fine ni denove konsideru „*Interlingua*”n. — Tamen ni, Esperantistoj, ne tro timu eventualan konkurencon de ĝi, kaj nepre ni ne fuŝu Esperanton pro timo antaŭ Interlingua! Ĉi tie mi volas citi diron de D-ro R o e l o f s. en letero kiun li antaŭ nelonge direktis al mi: „Ni nepre ne fuŝu Esperanton pro timo antaŭ Interlingua. Ĝi estas trompaĵo, kaj se scienculoj klopodos ĝin lerni kaj uzi — kion ili kredeble tute ne faros — ili rimarkos (spertos) tion.” — Do jam iuj Esperantistoj venis en la danĝeron de tento, pro timo antaŭ eventuala preterkuro de Interlingua, modifi iujn radikojn de la Fundamento favore al tiuj normigitaj radikoj de la IALA-Vortaro, ekz-e modifi „*gratul*” en „*kon-gratul*” aŭ „*vund*” en „*vuln*” aŭ „*vulner*”. Ni, Esperantistoj, do ne fuŝu Esperanton kaj nepre konservu la radikojn kiujn nia majstro Z a m e n h o f elektis en sia Universala Vortaro.

La skribinto de ĉi tiuj linioj petas la Akademion de Esperanto, ĝustatempe revizii nur tiajn radikojn kiuj evidente estas arkaikaj, kaj cetere kontraŭstari eventualan fuŝan evoluadon.

019.941
(048.1)

RECENZOJ KAJ BIBLIOGRAFIO

8 = 089.1{-1 + -8}„1887/1957”

Esperanta Antologio, Poemoj (1887-1957). Redaktis William Auld. Eldonis kiel n-rojn 11-12 de la belliteratura eldonserio de *Stafeto* J. R é g u l o, La Laguna, Kanariaj Insuloj. — Eldonnumero 2600. Formato 155 × 215 mm². Prezo de bindita ekzemplero 67,2 steloj, de broŝurita ekzemplero 57,6 steloj.

Jen kian donacon faris al ni ĉe la sojlo de la Zamenhof-jaro nia poeto kaj beletristo kaj laboreganta samideano William Auld kaj nia heroo eldonisto Juan R é g u l o P é r e z! Sescent-kvardek-paĝa volumo kun pli ol 350 originalaj poemoj de pli ol 90 poetoj el pli ol 30 landoj el ĉiuj partoj de la mondo, kaj tamen apertenantaj al unu popolo, la nia! Nin enkondukas la redaktoro per 17-paĝa artikolo kaj poema De-

diĉo. La Esperantan poetojn de tiu 70-jara periodo li dividis en tri grupojn aŭ periodojn: (1) „Primitiva Romantismo” (1887-1919), (2) „Popularita Romantismo” (1919-1939), (3) „Metafiziko” (1945-?). Al la unua el ĉi tiuj periodoj estas dediĉitaj 73 paĝoj, al la dua 289 paĝoj (kun ĉefaj kolonoj: K a l o c s a y, B a g h y, kaj en dua vico T á r k o n y kaj K u r z e n s), kaj al la tria, en kiu Britujo ludas gravan rolon, 167 paĝoj. En Aldonaĵo troviĝas fragmento el epopea poemo de pastro Johano Ricci; ĉi tiu poemo, kun la amplekso de la Dia Komedio, finverkita en 1926, neniam trovis eldoniston. La nun publikigita fragmento estas 4-paĝa.

Sekvas unupaĝa Postnoto de la redaktoro, 6-paĝa Glosaro, 12-paĝa Notaro, 15 paĝoj da biografietoj, 18-paĝa enhavotabelo, kaj unu paĝo da korektendaĵoj.

Ĉi tiu libro montras al tiuj kiuj ankoraŭ tion ne sciis, ke vivas la internacia lingvo, ke floras riĉe ĝia poezio, ke tiu poezio plene maturiĝis, kaj neniel bezonas honti antaŭ tiuj de la naciaj kulturlingvoj. Inter niaj poetoj ĉiaj profesioj estas reprezentitaj: kuracistoj, inĝenieroj, instruistoj, ĵurnalistoj, pastroj, oficistoj, sed ankaŭ troviĝas karbministo kaj havenlaboristo. La plej freŝdata Esperantista poeto reprezentita en la Antologio lernis la lingvon nur en 1955 kaj verkis sian unuan esperantan poemon kvin monatojn poste; en „Belarto” li mem miris pri „*La miraklo de la Esperanta poezio*”. Rimarkinde estas ke inter la 90 poetoj estas nur 9 virinoj.

Kun ĝojo mi renkontis en ĉi tiu Antologio multajn poemojn jam pli frue admiritajn aŭ jam de longe al mi karajn; kun eĉ pli granda ĝojo mi unuafoje renkontis perlojn de nia poezio kiujn mi ankoraŭ ne konis. Kaj kiam oni kelkfoje vane serĉas poemon de poeto ŝatata (kiel mi ekz. de Juliette B a u d i n), oni pripensu ke Antologio ja ne povas kompleti!

Verkante ĉi tiun recenzon mi nun publike esprimu supozon kiu ekstis ĉe mi jam antaŭ multaj jaroj. En la konata „*Siberia Lulkanto*” de B a g h y troviĝas la versoj

„*Prude krude fremdaj homoj
venas el insid' ...*” (p. 160, tute malsupre).

Longe mi estis mirinta pri tiu vorto „*prude*”, kiu, laŭ sia senco, ege strange impresas en ĉi tiu kunteksto; tiam, subite, mi ekhavis la ideon ke ĝi estas simpla preseraro en la originalo (*Preter la Vivo*), kiun oni poste simple kopiis, kaj ke la ĝusta vorto estas „*trude*”. Ĉar la poeto ankoraŭ vivas, estus bone, se li mem forigus la dubon pri ĉi tiu punkto.

Kvankam mi scias ke oni ege klopodis pri la biografietoj, tamen ne ĉio estas en ordo. Neĝustaj estas la indikoj pri la prononco de la nomoj Jan v a n S c h o o r (ĝuste: van sho:r, perfekte rimanta al *kor*) kaj Lodewijk Cornelis De ij (ĝuste: dej) kaj eble de aliaj. Laŭ informo kiun mi iam legis en *La Juna Vivo* Ludmila J e v s e j e v a estis mortigata en la dua mondmilito; (laŭ ŝia biografieto oni kredus, ke ŝi ankoraŭ vivas). Pri kelkaj pseŭdonimoj la „biografietoj” intence mistifikas.

Se noto sur p. 593 pri la usona poeto Ezra P o u n d diras ke „li konvertiĝis al faŝismo”, mi kredas ke A u l d ne estas tute justa al li; mi havas la impreson ke ĉi tiu granda poeto estis pli samideano de mi, ol faŝisto, kaj ke nur lia ega malamo al la „uzurokratio” kaj naŭva espero ke M u s s o l i n i ĝin rompos, igis P o u n d aliancanon de la faŝismo. Kiu tradukos liajn „*Pizajn Kantojn*” en Esperanton?

En sia recenzo pri ĉi tiu verko en „*Esperanto*” (Februaro, 1959) s-ino

C. C. Guglielmini mire konstatas ke la poemoj ne perfidas la naciecon de la poetoj. Estus ege interese se pri tio eblus konvinka eksperimento. Bedaŭrinde, tamen, tia eksperimento ŝajnas praktike ne ebla. Oni ja devus disponi pri beletristoj konantaj multajn naciajn literaturojn kaj lingvojn kaj ne konantaj la esperantajn poemojn, kaj peti ilin diveni la naciecon de la aŭtoroj! Sed alia eksperimento certe eblus: niaj ĉefaj literaturaj gazetoj povus publikigi novajn poemojn ne menciante la aŭtorojn kaj invitante la legantojn diveni la naciecon de la aŭtoro de ĉiu unuopa poemo. Ĉe la ĉiujaraj literaturaj konkursoj la juĝantoj povus fari la samon. Verŝajne tia eksperimento konfirmus la konstaton de s-ino Guglielmini.

Al tiuj legantoj kiuj estas amantoj de nia literaturo, mi ja ne bezonas rekomendi ĉi tiun monumenton de nia originala poezio, — sendube ili jam aĉetis ĝin —, sed al la aliaj por kiuj la literaturo kaj la poezio ne estas unuavicaĵo, mi insiste diras: Almenaŭ ĉi tiun perllokolekton vi posedu; almenaŭ ĝin legu, por ke nia literaturo estu por vi ne io fremda; eble la gusto plaĉos kaj instigos vin al pli ofta gustumo. Sed rapidu; ne prokrastu la aĉeton, ĉar, se efektiviĝos mia deziro, tre baldaŭ ĉi tiu bonega eldonaĵo estos elĉerpita! — W. P. R.

INDEKSOJ por Vol. 9 kaj 10.

(Kompilitaj de A. Warner)

Indekso de personoj (aŭtoroj kaj aliaj).

- | | | |
|-----------------------|-------------------------|------------------------|
| Adrian 9 56 | Bean 10 72 | de Broglie, L. 9 56 |
| Agathias 9 158 | de Beaufront 9 101, | Brouwer, M. 10 129 |
| Aleksandro VI-a 9 16 | 110 | Bruno, G. 10 50 |
| Alexandersson, S. | Becquerel 10 51 | Bujwid, O. 10 130 |
| 9 36, 37, 39, 160; | Belinfante, F. J. 9 118 | Bulkur, R. 9 159 |
| 10 116 | Bennemann, P. 10 137 | Bunyan, J. 9 155 |
| Anaximander 10 50 | Benoit, R. 10 130 | Burnazel, K. 9 159 |
| Anaximenes 10 50 | Bernard, R. 9 124, | Butler, M. C. 9 106, |
| Applebaum, J. D. | 10 135 | 110, 112 |
| 9 106, 110; 10 39, 40 | Black 9 133 | Bydzovský de Floren- |
| Arturo, reĝo 9 155 | Bluett, T. L. C. 9 28, | tin, M. 9 3 |
| de Assis, M. 10 144 | 53, 58, 10 46 | Byrd 9 51 |
| Auld, W. 9 29, 155, | Boggs 9 20 | |
| 156, 158; 10 150, 151 | Bohr, N. 10 54, 55, 61 | Capp, C. D. A. 9 155 |
| Åvall, H. 10 133 | Boirac 9 112 | Carlsson, M. 9 124 |
| | Bonnard, P. 10 124 | Carnot 9 26 |
| Baghy 9 106, 110; | v. d. Boogaard 10 118 | Cart 9 112 |
| 10 151 | Borel 9 77 | de Caspary, M. 10 1, |
| Bailey, W. 9 112 | Born, M. 10 46 | 117 |
| Baker, R. S. B. 9 5 | Boulton, M. 9 70, 155, | Celsus 9 15 |
| Balladore-Pallieri | 159, 160, 10 136, | Cerri, C. 9 40 |
| 9 17 | 143 | Cervantes 9 159 |
| Banham, F. R. 9 155 | Bréal, M. J. A. 9 72 | Charlet, F. 10 148 |
| Barbosa, R. 10 72 | Brenton, N. 9 155 | Chaucer (1340?-1400) |
| Barlow, G. 9 159 | Bretschneider, H. | 9 155 |
| Bartolus 9 18 | 9 115 | Christian III-a 9 89 |
| Bastien 9 106, 110 | Bridie, J. 9 72 | Christian IV-a 9 89 |
| Baudelaire, C. 9 122, | Briquet 9 119 | Ciliga, P. 10 118, 124 |
| 123, 124, 126, 127 | Brkić, D. 9 39, 160, | Collinson, W. E. 9 6, |
| Baudin, J. 10 151 | 10 116 | 94, 105, 106, 110 |

- Cotton, A. **10** 130
 Couturat **9** 95, 105, 110
 Cresswell, J. **9** 30
 Crusafont Pairó, M. **10** 95, 97, 98, 99, 100, 101
 Cseh **10** 37
 Culbert, S. S. **9** 80

 Dalmau, D. **9** 29, 115
 Dalton, J. **10** 51
 Dart **9** 131
 Darwin **9** 135
 Dawson, C. **9** 26, 27, 28, 134
 Debye **9** 48
 Defoe, D. **9** 155
 Deij, L. C. **10** 151
 Dellian, K. **9** 117, 118, **10** 116
 Demokritos **10** 50
 Deperet **10** 98
 Derieuw, J. **9** 36
 Dewey **10** 67
 Dinwoodie, J. S. **9** 155, 156
 Donneis, A. **9** 36
 Drake **9** 15
 Dresen, H. **9** 124
 Drezén **9** 99, 104, 105, 107, 110, 112
 Dubois **9** 132, 136
 Duncan **9** 28

 Ebert **9** 50
 Edgardo, reço **9** 15
 von Eichendorff, J. **10** 137
 Eichenwald **10** 84
 Einstein, A. **9** 30; **10** 52, 58
 Eisenhower **9** 59
 Elizabeto, regino **9** 15, 16
 Emba **9** 159
 Empson, W. **9** 72
 Epstein, F. **9** 160

 Fahrenheit **10** 41
 Fedro, vidu Phaerudrus
 Ferguson, G. J. **10** 85
 Fermi, E. **10** 51, 56
 Fernqvist, J. **10** 133
 Filatov, V. P. **9** 64

 Fischer, I. **9** 152
 Fontboté, J. M. **10** 103
 Foote, A. D. **9** 155, 156
 Förster, W. **10** 130
 Francis, J. **9** 29, 155, 156
 Franck, J. **10** 52
 Fréchet, M. **10** 44, 105, 112, 116, 130

 Galiani, F. **9** 19
 Galilei, G. **10** 48, 50
 Geiger **9** 55; **10** 76, 78, 79
 Gentilis **9** 17
 Gesell, S. **9** 152
 Ghandi, M. **10** 58
 Gidel, G. **9** 23
 Ginz, O. **9** 4
 Goldsmith, O. **9** 155, 157
 Goudriaan, J. **9** 152, 153
 van der Graaff **9** 46
 Grabowski **9** 106, 110
 Graversen, C. **9** 157
 Gregor, D. B. **9** 92, 111, 126
 Gremjackaja, V. G. **9** 61
 Grimsehl **9** 50
 Grotius, H. **9** 16, 17, 19
 Guglielminetti, C. C. **10** 152
 Gunning, C. P. **10** 129
 Ćuĝev, S. **9** 36
 Haeckel **9** 132
 Haferkorn, R. **9** 117, 118, 119; **10** 114, 116, 118, 146
 Hahn **9** 57; **10** 51
 Hamberg, B. **9** 158
 Hamming, G. **9** 153; **10** 116, 129
 Hankel, M. **9** 93
 Hanuš **10** 119
 Happach, V. **10** 114, 115
 Hartley, J. **9** 28, 29, 30, 122
 Hartman, P. **10** 129
 Hartmann **9** 50

 Hauer **9** 50
 Hecht, K. **9** 50
 Heine **9** 106
 Heintz **9** 143, 144, 145, 146
 Heisenberg **10** 54
 Helmuth, F. E. **10** 132
 Hernández-Pacheco **10** 100
 Herostratos **10** 58
 Hintze, S. **10** 133
 Hitler **10** 46, 50, 52, 55
 Hölscher, E. **9** 32
 Hori, S. **10** 107
 Houtgast **10** 135
 Hugo, V. **9** 123
 Hunt, E. **9** 151
 Huntington, E. V. **10** 130
 Huxley, A. **10** 57
 Huygens **10** 54

 Ĥolodnij, N. T. **9** 65

 Jakimov, P. J. **9** 65
 Jakob, H. **10** 146
 Jakobo I-a **9** 16, 19
 Janović, M. D. **9** 63
 Jarvik **9** 141, 142, 143, 144, 145, 146, 147
 Javal **9** 101, 110
 Jervis, G. C. **9** 155
 Jespersen **9** 8, 94, 110; **10** 67
 Jevsejeva, L. **10** 151
 Jevtović, M. **9** 160
 Joad, C. E. M. **9** 72
 Johansson, E. **10** 133
 Johnson, S. **9** 156, 157
 Jones, D. **9** 7
 Jordan, P. **10** 56
 Jordanov, L. **9** 66
 Jørgensen **10** 117
 Joubert **9** 57
 Jung, T. **9** 156
 Jungk, R. **10** 56
 Justinianus **9** 15
 Kaeding **10** 71
 Kalocsay, K. **9** 112, 122, 124, 158; **10** 138, 151
 Karlo I-a **9** 17
 de Kempis, T. **9** 4
 Keynes, J. M. **9** 156
 Kjarval **10** 136

- Kobylinski, H. **9** 157
 de Kock, E. **10** 137
 Kodama, S. **10** 110
 Komenský, J. A. **9** 3
 Kosinaka, H. **9** 159
 Kotzin **9** 105, 110
 Kristo **9** 78, **10** 61
 Kruit, W. F. **9** 159
 Kubojama **9** 53
 Kurzens **10** 151

 La Fontaine **9** 158
 Lamm, R. **10** 133
 Lanti, E. **9** 14; **10** 116,
 134, 136
 Larsson, G. **10** 133
 Latimer **9** 150
 Laurat, L. **9** 159
 Lavalle, P. **9** 29
 Lavocat **10** 98
 Ledon **9** 159
 Lenander, S. E. **10** 133
 Leono (886-911) **9** 17
 Leslie, J. W. **9** 5
 Leükippos **10** 50
 Lewin, R. A. **9** 37, 53
 von der Ley **9** 35
 Libby, W. F. **10** 75, 76,
 78, 79, 80, 81, 82, 83,
 84, 85
 Loja, J. **9** 129
 Lonsdale K. **9** 58
 Lorge **10** 71
 Loschmidt **9** 45, **10** 78
 Lucinius **9** 159
 Luyken **9** 106, 110

 MacDonald, D. J. M.
9 56
 Mácha, K. H. **9** 4
 Madach **10** 139
 Makking, G. F. **9** 28,
 29, 33, 116, 120, 122,
 155; **10** 2, 44, 45, 116,
 118, 129, 137, 138
 Malan **9** 151
 Malmanche, A. L.
10 2
 Malthus, T. **10** 60
 de Mandeville, B.
9 156
 Marcianus **9** 15
 Marelli, P. **10** 132
 Marin **9** 93
 Marlowe, C. **9** 70

 Marx **10** 40
 Masterman, K. **10** 124
 Matkowski, E. **9** 159
 Mañ-ce-tung **10** 43
 Mayor **9** 102, 110
 de Medeyros, J. P.
10 144
 Meinsma, G. J. **10** 129
 Mendel **10** 51
 Mendeleev **10** 74
 Merimée **9** 77
 Merrick, F. **10** 136
 Michalski, T. J. **10** 144
 Michaux **9** 105
 Mijake, Š. **9** 117
 Mildwurf, A. **9** 160
 Miller, G. A. **10** 67, 71,
 72
 Millidge **9** 110
 Millot **9** 151
 Mimó Espinalt, L.
10 95
 Minnaert **10** 135
 Minnaja, N. **10** 124
 Moberg, K. J. **10** 131
 Moll, J. W. **10** 2
 Mulders **10** 135
 Muller, M. **9** 159
 Müller, E. W. **9** 41,
 43, 44, 50
 Munthe, A. **9** 40
 Music, Z. **9** 119

 Neergaard, P. **9** 120,
 121; **10** 84, 85, 116,
 117, 121, 130
 Nemcová, B. **9** 4
 Nery, F. **10** 72
 Newton **10** 48, 53, 54
 Niemöller **9** 57
 Nishawaki, Y. **9** 53, 55
 Nishi, S. **9** 33, 116,
 117; **10** 116, 130
 Nobel **10** 58
 Novotelnov, N. V. **9** 62
 Nyhlén, Å. **10** 133

 Oakley, K. **9** 27
 Ockey, E. P. **9** 155
 Ogden, C. K. **9** 72
 Oliphant **9** 57
 Oppenheim **9** 16
 Oppenheimer, R.
10 56
 Orwell, G. **10** 57

 Palacký **9** 3
 Pascal, B. **10** 48
 Peneter, P. **10** 40
 Penman **9** 155
 Pesonen, U. **10** 116
 Phaedrus **9** 158
 Pimentel, C. **10** 132
 Pittioni, R. **10** 85
 Planck **10** 53
 Ploussu, A. **9** 160
 Pohl **10** 84
 Pomponius **9** 15
 Pope, A. **9** 156
 Popović, B. **9** 34, 35,
 36, 37, 39, 160;
10 39, 105, 116, 119,
 123, 128
 Pound, E. L. **10** 151
 Price, D. J. **10** 49
 Privat, E. **10** 134
 Puchalski, J. **10** 144
 Pulle, A. A. **10** 2

 Rabelezo **9** 159
 Régulo Pérez, J. **9** 126,
 159; **10** 39, 40, 145,
 150
 Reinders, E. **10** 2
 Rektorisová, M. **9** 1
 Rembrandt **9** 159
 Revelle, R. **9** 50, 53
 De Ria **9** 95, 105
 Ricci **10** 151
 Richards, I. A. **9** 72,
 76
 Riechert, J. **9** 31
 Roelofs, W. P. **9** 28,
 31, 32, 33, 93, 120,
 122, 129, 152, 155,
 157, 158, 159, 160;
10 37, 40, 43, 46, 113,
 116, 118, 129, 131,
 132, 133, 134, 136,
 137, 139, 141, 142,
 143, 144, 146, 152
 Rollet de l'Isle, M.
10 130
 Romans **10** 99
 Röntgen **10** 51
 Roosevelt **10** 52
 Rosendahl, H. **9** 142;
10 131
 Rossetti, R. **9** 155,
 156; **10** 39, 134

- Russell, B. **9** 56, 58;
10 58
 Rutherford **10** 51
 Sadler, V. **9** 127;
10 67, 124
 Sahlström, H. **10** 133
 Salisbury **9** 20
 Sarti, Fra P. **9** 17
 de Saussure **9** 111, 112
 Säve-Söderbergh
9 141, 142
 Schaffhausen **9** 135
 Schaub **10** 101
 Scherrer **9** 48
 Schoor, J. van **10** 151
 Schmidt, A. **10** 130
 Schwartz, R. **9** 159
 Schweitzer, A. **9** 58;
10 58, 142
 Sébert, H. **10** 130
 Sedlecký, L. **9** 2, 4
 ten Seldam, C. A.
9 160
 Selden, J. **9** 16
 Setälä **9** 112
 Shakespeare **9** 155;
10 138
 Shaw, G. B. **10** 144
 Shinoda **9** 117
 Sidorov, A. **9** 61
 Simić, H. **10** 124
 Simpson **10** 96
 Simunic, S. **9** 160
 Sirk, H. **9** 35, 40, 41,
 50; **10** 13, 116, 118
 Slijper, C. F. W. **10** 2
 Slotemaker de Bruine,
 G. H. **10** 129
 Smith, J. L. B. **9** 150,
 151
 Smith, N. **9** 34; **10** 113,
 119
 Smith Woodward **9** 26
 Söderberg, K. **9** 83
 Sokrato **9** 70
 Solé Sabaris **10** 99
 Solzbacher, W. **10** 134,
 136
 Spengler **10** 48
 Spiridonov, F. M. **9** 64
 Stage, M. **9** 120, 121;
10 130
 Starr, M. **9** 159
 Stensiö **9** 141
 Stojan **9** 93, 95, 99,
 105, 106, 110; **10** 37
 Stöp-Bowitz, C. **9** 33,
 34, 35, 36, 65, 130,
 141; **10** 1, 116, 130
 Strassmann **10** 51
 Stutterheim **10** 129
 Swift, J. **9** 155, 156;
10 138, 139
 Szathmári, S. **9** 159,
10 138
 Szilágyi, F. **9** 76;
10 69, 143
 Špak, N. I. **9** 64
 Tadokoro **9** 117
 Tárkony **9** 124; **10** 151
 Teller, E. **10** 56
 Thales **10** 50
 Thomson, J. J. **10** 51,
 130
 Thorndike **10** 71
 Tokin, B. P. **9** 61
 Tolstoj, L. **9** 159
 Tomaschek **9** 50
 Tomaso de Kempis **9** 4
 Tometorp, G. **10** 133
 Totsche, vidu Tárkony
 Toynbee **10** 48
 Truman **9** 24, 57;
10 52
 Truyols **10** 98
 Turner **10** 137
 van der Tweel, L. H.
9 154
 Ulpianus **9** 15
 Ulysses **9** 52
 Vatré, H. **9** 124
 Venture, A. **9** 155
 Viktorino, reĝino **9** 76
 Villalta **10** 97, 98, 100,
 101, 103
 Virchow **9** 135
 Viret **10** 99
 Virgilio **9** 102, 106
 Voltaire **9** 32; **10** 32
 Volter, vidu Voltaire
 de Wahl **9** 106, 110
 Wajsblum, M. **9** 105,
 110, 154
 Waringhien, G. **9** 28,
 105, 106, 107, 110,
 115, 118, 122, 123,
 124, 155, 156;
10 115, 134, 135, 136
 Warner, A. **10** 113, 116
 Watier, R. **9** 35
 Weiner, J. S. **9** 26, 27
 Welleminsky, J. **9** 40
 Wells, J. C. **10** 124
 Wendt, G. **9** 59
 Whorf **9** 6
 Wicherkiewicz **9** 105
 Wilkins, J. **9** 156
 Wilson **9** 41; **10** 75
 Witkowitz, J. **10** 144
 Wüster, E. **9** 106, 110,
 117, 118; **10** 135, 146,
 148, 149, 150
 Yagi, H. **10** 63
 Yamazoe **9** 117
 Young **9** 131
 Zakrzewski **9** 105, 110
 Zamenhof, Lidja **9** 106,
 110
 Zamenhof, L. L. **9** 12,
 93, 94, 95, 96, 97, 98,
 99, 100, 101, 102, 103,
 104, 105, 106, 111,
 112, 113; **10** 84, 149,
 150
 Zeuner, F. E. **10** 84
 Ziegler, S. **10** 124
 Zlatnar, P. **9** 119

Indekso de temoj kaj terminoj.

(La indeksitaj terminoj estas dike presitaj).

- abrazio** 9 120
 „ACHEMA-Jahrbuch” 9 115
afiksoj 10 68
afrikantropo njarasa 9 133
 aĝo de organikajoj 10 73
Akademio 10 116, 150
aktinisto 9 146, 149
aktinopteriko 9 142
alkresko 9 68
ambiguelo 9 72
anafora 9 9, 10
anatomio 9 116, 141
 „Angla Antologio” 9 155
angulmezuri 10 115
antaŭkambrio 9 142
antibiotikoj vegetajaj 9 61-65
 „Antologio, Angla” 9 155
 Esperanta 10 150
antrakosaŭro 9 148, 149
antropologio 9 130-140
aparatoj kemiaj 9 115
arbaroj 9 5, 66-70
asoci-strukturo 9 76, 78
astronomio 10 132
atomo, La homo kaj la 10 46-62
atomojn vidi 9 41-50
atombomboj 9 53, 55, 57; 10 52, 55, 62
 damaĝo de — en postaj jaroj 9 53, 55; 10 63
atomkerna tekniko 9 58; 10 47
aŭstralopiteko afrika 9 131
aŭtoktona 10 96, 98, 99, 100, 101, 103
batrako 9 146, 147, 148, 149, 150
batrakoido 9 148
belarto 9 28; 10 136, 137, 138, 143
 „Beletro, Eseoj I.” 9 28
bibliografio 9 50, 105, 109, 112; 10 72, 84, 133
 vidu ankaŭ: recenzoj
biblioteko popular-sciencia 9 120, 160; 10 119, 129
biotopo 10 96, 100, 102
botaniko 9 61, 120
CED 10 105
celakanto 9 144
celakantado 9 150, 151
celakantoforma 9 144, 145, 146, 149, 150
 „Cent Ĝojkantoj” 10 143
CIKI 9 39, 129; 10 113, 117, 119, 122
ciklostomo 9 141
ĉelmuko 9 121
 „Ĉinio, La Revolucio de” 9 157
damaĝuloj, vidu: parazitoj
DECHEMA 9 115
 „Defalajoj, La” 9 122
dekkvinuma sistemo 10 141
deklaro pri la homaj rajtoj 9 42
delekti 9 127
 „dentaro, Morfologia atlaso de homa” 9 119
determinismo 10 48
deveno de la homo 9 130-140
devonio 9 142
 „Dialekto, Dialektiko” 9 29
diskuto pri terminoj, vidu: terminoj
dista 9 119
distala 9 119, 120
disvolviĝo de civilizo 10 49
domaĝo de la atombombo en postaj jaroj 10 63
dramo 10 39
drupo 9 122
duuma sistemo 10 141
-ed- 10 96
edukado, elekto al 9 83
egaleco jura de ŝtatoj 10 72
ekologia 10 95, 99, 101
 „Ekonomio de Studado” 9 31
ekvedo 10 101
elasmobranko 9 142, 144
elektrona emisio 9 41
elektrona lenso 9 41
 „El la Vivo de Netaŭgulo” 10 137
energiproblemo 9 58; 10 59, 60, 66
enketo, vidu: Esperanto
eoantropo Dawson'a 9 26, 134
eolitiko 9 135, 136
epirogena 10 96
eritrocito 10 64
 „Eseoj I. Beletro” 9 28
 „Esperanta Antologio” 10 150
Esperanto
afiksoj 10 116
Akademio de — 10 116
Enciklopedio de — 10 146
fontoj de — 9 92-110
gramatika kategorio de esperantaj radikoj 9 111
gramatika strukturo de la angla lingvo kompare kun tiu de — 9 6-13

- (Esperanto)
instruo de — 9 29, 30, 79
korelativoj 9 97; 10 69
lingvistiko de —, vidu: Esperantologio, termin(ar)-oj, vortaro
organizaĵoj de —, vidu: CED, CIKI, IGA, ISAE, STELO, UEA
oftecoj relativaj de kelkaj lingvaj elementoj en — 10 67-72
— kaj scienco 9 65, 116, 117; 10 44
en Brazilo 10 132
en Italujo 10 132
en Nederlando 9 153, 10 129
en sciencaj kaj teknikaj periodaĵoj (enketo) 10 105-111
en Sovetunio 9 160
en Svedujo 10 133
fakrevuoj en — 9 35, 60; 10 105, 120, 132
semantiko 9 70-80
— kaj studentoj, vidu: STELO
supersignoj 10 144
— kaj tradukoj 10 138
vortfarado 10 114
vortlongeco 10 71
vortoj kaj ties signifo 9 70-80
Esperantologio (vidu ankaŭ: termin(ar)-oj) 9 6, 29, 30, 70-80, 92-110, 111-115; 10 35-37, 67-72, 114, 144
ezokfaŭko 9 12
„Ezopa Saĝo” 9 158
fajnegulilo 9 153
fakterminaroj, vidu: terminaroj, vortaroj
falfoliaj arboj 9 12
FAO 10 85, 86, 93
farmacio 10 132
fenakodontedo 10 96
FID 9 118
filozofio de komplementeco 10 54
filozofoj
ekzistadismaj — 10 57
grekaj — 10 50
fitoncido 9 61, 62, 63, 64, 65
fiziologio 9 53
floemo 9 122
„Floroj de l’Malbono, La” 9 122
fonemoj 9 6, 10 67
fonetiko 9 6, 94; 10 67
fonologio 9 13
forĵetajoj radioaktivaj 9 60, 10 60
fosilioj 9 26, 130, 141; 10 95
fotosintezo 9 68
„Fragmentoj rilataj al La Floroj de l’Malbono” 9 122
gasteorio kinetika 10 51, 53
Geiger-nombrilo 9 55; 10 78, 79, 84
genocido 10 42
geofizika jaro internacia 9 37, 50-53
geografoj, vidu: IGA
geologio 10 4
geomagneta 10 78
gibono 9 132
glaciĉapelo 9 51
goniometri 10 115
gramatika strukturo de la angla lingvo 9 6-13
grameno 10 90
ĝardenkulturo 10 133
ĝermingo 9 12
hejdelbergulo 9 134, 136
Herculaneum 9 1, 2
heredofaktoro 10 61
hidrogena bombo 10 56, 66
hiperkeratozo 10 65
Hiroŝima 9 55; 10 63, 64, 65, 66
historio, vidu: disvolviĝo
— kaj ĝia strukturo 10 47
homaj rajtoj, universala deklaro pri la 10 42
homo, la deveno de la 9 130-140
„Homoj kaj Riveroj” 9 158
homo hejdelberga 9 134
homo neandertala 9 135
homo rodezia 9 137
homo saĝa 9 137, 138, 139
homo soloa 9 137
hoano 9 143, 144, 145, 146
hoanulo 9 149
IALA 10 148, 149, 150
Iberia duoninsulo 10 95-105
IEC 10 147, 150
IGA 9 35
ILO 9 60
„Infana Raso” 9 29
infesti 10 92, 94, 95
inflacio 9 152
ingeniera revuo 10 132
Interlingua 10 146, 148, 149, 150
intonacio 9 7, 9
ISAE, vidu: ISO
ISAE
agado 1957 10 116, 150
biblioteko 9 35; 10 1, 117
popularscienca — 10 119, 129, 160
bulteno 10 118, 128, 160
ekonomia raporto 9 38; 10 38

- elektroteknika sekcio 9 36
 fondaĵo „Scienco” 9 35, 36, 38, 39, 160
 informoj 9 36, 160
 jarkunveno 9 34, 160; 10 117, 129
 jubileo de la prezidanto 9 33
 korespondanconco 9 129
 kotizoj 9 37
 kultura interŝanĝo, vidu: CIKI
 nekrologo 9 40
 organo, vidu: Scienc Revuo
 referendumo 10 117, 128
 rezolucio 9 34
 „Sciencaj Studoj” 9 35; 10 116, 117, 119, 130
 statuto 9 36; 10 117, 125-128
 STELO 10 123, 129
 terminologia sekcio 9 38, 117, 118, 160; 10 116, 119
 traduka servo 9 34, 36; 10 113, 117, 119
 UEA-ISAE 10 117, 128
 ISO (kaj ISA) 9 118, 147, 148, 149, 150
 ISU-prelegoj 9 6, 14, 41, 70, 83, 130, 141; 10 63, 73, 85, 118
 izotopoj radioaktivaj 9 60; 10 73
 apliko de — 9 60; 10 59
 -jer- 10 35
 „Jozefo” 10 39
 „Jubilea Verkaro” (al S. Nishi) 9 116
 jura egaleco 10 72
 juro internacia 9 14; 10 85
 kaloto 9 45, 46, 48
 kampelektrono 9 41, 44
 „Kandid” 9 32
 kantoj 10 143
 karbono 10 73
 karbonio 9 142
 kaskofloro 9 121
 katastrofo atoma 10 63
 kategorioj gramatikaj 9 111; 10 70
 kavalirsprono 9 121
 kazoo 10 139, 140
 keloido 10 64
 kemia tekniko 9 115
 kernreagujo 10 51, 59, 61
 „Kiu estas kiu?” 10 145
 klimatologio kaj arbaroj 9 5
 koleoptilo 9 121
 komerco kun nepagipovaj landoj 9 129
 komplementeco 10 54
 komunitato 9 89
 konservo de antikvaj paperrulaĵoj 9 1-4
 konstanto radioaktiva 10 73, 78
 kon-teoria 10 53, 54
 kontinenta breto 9 23, 24
 kontraŭ-koincida konekto 10 79
 korelativoj 10 69
 korpuskloj 10 51, 54, 73
 kosmo, vidu: geofizika jaro
 krimo kolektiva 10 53
 kristalografio 9 47
 kromio 9 47
 krospteriko 9 142, 143, 144, 145, 146, 147, 148, 149, 150, 151
 krudmaterialnormo 9 152
 ksilemo 9 122
 kultura interŝanĝo, vidu: CIKI
 labororganizo, vidu: ILO
 latimerio 9 150
 lernejoj 9 83
 lernolibro 9 30
 libroj popularsciencaj 10 119
 librokonservo 9 1-4
 lignoproblemoj 9 66-70
 lingvaj konsiloj 10 35, 41, 130, 141
 lingvistiko 9 29, 70, 80, 92, 111; 10 134, 136
 lingvo, vidu ankaŭ: Esperantologio, normigo
 — angla, strukturo de 9 6
 — internacia en scienco kaj tekniko 9 34, 37, 60, 65; 10 105, 117, 119, 123
 Mainau, manifesto de 10 58
 makzelulo 9 141, 142, 149
 maligna 10 64, 66
 maro en internacia juro 9 14-25
 matematiko, lernado de 10 112-113
 Medicina Revuo 9 36
 mekaniko
 klasika — 10 48
 kvantuma — 10 51, 54
 statistika — 10 53
 metodologio 9 31
 mikroorganismo 9 61, 62
 mikroskopo elektrona 9 41
 mikroskopio 9 41
 milito malvarma 10 55
 „Mistero Minora” 10 143
 modeleksperimento 9 49
 mono konstantvalora 9 152
 „Morfologia atlaso de homa dentaro” 9 119
 Nagasaki 9 55; 10 63, 64, 66

- naturleĝoj 10 48, 50
 nazosako 9 143, 144
 neandertalulo 9 136,
 137, 138, 139, 140
 neologismoj 10 114,
 136, vidu ankaŭ:
 terminoj
 „Netaŭgulo, El la vivo
 de” 10 137
 nivoo 9 42, 50
 Nobel-premio 10 58
 normformo de termino
 10 149
 normigo de lingvo 9
 76, 78; 10 146
 novvortoj, vidu: neolo-
 gismoj
 nuda virgulino 9 121
 nulprocedo 9 10
 nulvaloro 10 79
 nutraĵo 10 85
- oftecoj
 — de lingvaj ele-
 mentoj 10 67-72
 — de lingvoj 9 80-
 83, 140
 okluda 9 120
 okluza 9 120
 ordovicio 9 142
 organizoj 9 35; 10 72,
 85, vidu: CED, CI-
 KI, DECHEMA,
 FAO, FID, IGA,
 ILO, ISAE, ISO,
 STELO, UATI,
 UEA, UNESCO,
 UNO
 orogena 10 96, 98
 osteolepo 9 144
 osteolepoforma 9 144,
 145, 146, 147, 148,
 149
 ostofiŝo 9 142, 149
 palearkta 10 95
 paleobiologio 10 95,
 103, 104
 paleobiogeografia 10
 95, 100
 paleomastologio 10 95,
 96, 98, 99, 100
 paleontologio 9 26,
 130, 141; 10 73
 paleozoologio 9 150
- parantropo fortika
 9 132
 parazitaj 10 86, 88, 89
 partio 10 91, 95
 pejli 10 115
 pepinjero 10 92, 95
 permio 9 142
 Piltdown, falsaĵo de 9
 26, 134, 136
 Pirenea zono 10 95
 pitekantropo rekta 9
 132, 133, 135, 136,
 140
 plantprotektado 10 85
 pleksiantropo trans-
 vala 9 131
 Plena Ilustrita Vorta-
 ro vidu: vortaro
 plumnaĝila fiŝo 9 142,
 144
 poemoj 9 29, 122, 158;
 10 39, 150
 poeziofobio 9 158
 poliamido 9 2
 politiko kaj atom-
 scienco 10 52, 55
 polonio 10 73
 polvo radioaktiva 9
 53, 55
 Pompei 9 1
 porolepo 9 144
 porolepoforma 9 144,
 145, 146, 147, 148,
 149, 150
 pramamulologio 10 95
 preamble 10 93, 95
 probablokalkulo 10 48
 procedotekniko 9 115
 progreso 9 129; 10 50
 proksimala 9 120
 prononco 10 67
 protruda 9 131
 provitamino 9 65
 pruntotraduko 10 147
 Ptolomea sistemo 10
 50
 pulmfiŝo 9 142, 143,
 144, 148
 radiado, influo de 9
 53, 55; 10 63, 73
 radioaktiveco, 9 27, 53,
 55, 60; 10 59, 63, 73
 absoluta specifa 10
 75, 78, 81, 84
- radiokarbono 10 73,
 74, 75, 76
 rakontoj 9 158
 rampuloido 9 148
 „Raso, La Infana” 9
 29
 reaktoro 9 60; 10 51,
 76
 recenzoj kaj bibliogra-
 fio 9 26-32, 115-127,
 155-160; 10 39-40,
 130-144, 150-152
 retikulo-sarkomo
 10 66
 „Retoriko” 10 134
 „Revolucio de Cinio,
 La” 9 157
 rezigno pri perforto 9
 57; 10 58
 rilatoj necertecaj
 10 54
 ripidisto 9 146, 149
 „Riveroj; Homoj kaj”
 9 158
 rodeziulo 9 138, 140
 rokedo 9 51
 romantiko 10 137
 ronduŝilo 9 141
 rubandgeneratoro 9 46
- scienco, vidu ankaŭ:
 Esperanto, ISAE
 Scienca Revuo 9 35,
 36, 154; 10 105, 117,
 118, 120, 130
 informoj kaj notoj
 de la redakcio 9
 50, 58, 105, 106,
 115, 129; 10 41
 konsiloj al aŭtoroj
 10 35-37
 korektoj 9 91, 140
 mankantaj numeroj
 9 40
 „Sciencaj Studoj”
 9 35; 10 116, 117,
 130
 sekvoj de atombom-
 bado 10 63
 semantika formo de
 termino 10 147
 semantiko internacia
 9 70-80
 „Senartifikulo” 9 32

- senmakzelulo** 9 141, 142, 149
Sennacieca Revuo 9 159
senvostulo 9 146
silurio 9 142
silvikultura 10 92
sinantropo pekinga 9 133, 135, 136, 140
 sindetruo 10 47
 „Stafeto” 9 28, 29, 120, 122, 126, 127; 10 39, 40, 145, 150
 statistiko 10 48, 95
 arbara — 9 66
 lingva — 9 80, 96, 99, 140; 10 67
stegocefalo 9 146, 147, 148, 149, 150
STELO 10 123, 129
 stipendioj 9 83
stohastika 10 48, 49
stratigrafio 10 104
 strukturo gramatika de la angla lingvo 9 6
 „Studado, Ekonomio de” 9 31
 studenta ligo, vidu: **STELO**
 studentoj 9 83
substituto 9 10
sukpremo 9 121
sukstreĉo 9 121
 supersignoj 10 144
- tabeloj pri lingvaj elementoj 10 68-71
 talentuloj 9 83
 „Teatro” 10 144
tektona 10 96
teleostomo 9 142
- terminaroj konstruteknika** 10 131
 pri florhavaj plantoj 10 2-35
 pri plantoj 9 121
 scienca kaj teknika (STT) 9 117-119
terminoj 9 50, 119, 120, 121, 122, 135, 137, 142, 147, 151; 10 95, 104, 114, 115, vidu ankaŭ: ISAE-terminologia sekcio kaj la dike presitajn vortojn en ĉi tiu indekso; temas pri terminoj netroveblaj en Plena Vortaro, Suplemento al Plena Vortaro, Scienca kaj Teknika Terminaro.
terminologio 9 117, 135, 137, 142; 10 132, 146 vidu ankaŭ: ISAE.
termonuklea 10 56
 „Tiel okazis” 10 143
timoteherbo 9 63
torono 10 81
 traduko de mondliteraturo 9 32; 10 138
 „Tri Verkoj de Volter” 9 32
tricio 10 56
UATI 10 147
UEA 9 34, 60; 10 105, 117, 128, 136, 146
ultramikroskopo 9 49
UNESCO (-novajoj) 9 58; 10 72, 147
- UNO** 9 60
 universitatoj 9 83; 10 123
urodelo 9 146
 utopio 10 139
uzurokratio 10 151
 valuto 9 152
 venenigo de la atmosfero 10 57, 61
 „Verda Vojo, La” 10 144
 vertebruloj, La parenceco inter 9 141-151
 „Vivo de Netaŭgulo, El la” 10 137
 „Vivo de la Plantoj, La” 9 120
 vivoprocezoj 10 54
vizori 10 115
vizuri 10 115
 „Vojaĝo en Kazohio” 10 138
 vortaro 9 115; 10 135, vidu: terminaroj
 fakvortaroj 10 147
IALA- aŭ **Interlingua-Vortaro** 10 148, 149, 150
IEC- — 10 147
 Plena Ilustrita — 9 118, 142, 160; 10 116
 Universala — 9 111
 vortfarado 10 114
 vortlongeco 10 71
 „Zadig” 9 32
zoologio 9 130, 141
 zoologoj, alvoko al 9 65

**ATAKOJ KONTRAŬ
ĜARDENPLANTOJ**
de D-ro Paul NEERGAARD

licenciato de hortikulturo, magistro kaj doktoro
de agronomio kaj sekciestro ĉe Stata Plant-
patologia Servo, Kopenhago, krome membro de
la Akademio de Esperanto

La unua libro aperinta en Esperanto:

pri ĜARDENKULTURO,
pri INSEKTOJ,

pri PLANTMALSANOJ,
pri DAMAĜAJ FUNGOJ.

La libro enhavas 234 paĝojn artpaperajn, kiuj enhavas 75 tekstfigurojn. Krome,
la libro enhavas 9 kolortabulojn, kiuj sume enhavas 85 figurojn, do la libro
entute enhavas 160 bildojn!

Belege tuttole bindita, kun ora stampo kaj kolorpresita kovrilo, desegnitaj de
la dana pentristo Mogens Zieler.

Prezo £ 1, afranko 9p.

Eldonita de
THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD, ANGLIJO

Mendebila ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando,
aŭ ĉe landaj kaj lokaj Libro-Servoj,

Profesoro ĉe la Agrikultura Kolegio de Okcident-Skotlando, D-ro
HUGH NICOL, Ph.D., F.R.I.C., F.R.S.E., en *Esperanto*:

Mi ne konas libron verkitan anglalingve kiu valoras siaspece la duonon de
"Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj" La libro estas perfekta kiel presajo, ĝia
lingvo estas senerara. Guebla de ĉiu — fakisto aŭ ne.

Ĉefĝardenisto ĉe la Stata Ĝardeneksperimentejo en Alnarp, Sve-
dujo, S-ro CARL A. KLANG en *Svenska Esperanto-Tidningen*:

Tre malofte oni vidas tiel modernan, aktualan, belpresitan kaj seneraran fak-
libron Pri la enhavo mi konstatis, ke ĝi estas pli moderna kaj aktuala ol
svedaj ĝardenlibroj, kiuj ĝis nun aperis.

Landaj Delegitoj

- Aŭstrujo: Prof. D-ro H. Sirk, Baumgasse 26,
Wien III.
- Argentino: C. Wappers, Peña 2562, *Buenos Aires.*
III.
- Belgujo (peranto): Flandra Esperanto-Instituto,
Blankenberge Steenweg 72, *Brugge.*
- Brazilo: C. Pimentel, r. Rio Grande Norte 156 c. 1,
S. André-S.P.
- Britujo: (peranto) British Esperanto Association
Inc., 140 Holland Park Av., *London, W 11.*
- Bulgarujo: D-ro S. Ĝuĝev, str. Parĉeviĉ 13, *Sofia.*
- Ĉeĥoslovakio: Ph. A. Mr. J. Hanuŝ, Navrátilova 4,
Praha 2.
- Danujo: Farm. kand. Vagn Jørgensen, Kongegade
24 1, *Nyborg.*
- Finnlando: D-ro E. Kääriäinen, Edelfeltintie 3,
Helsinki.
- Francujo: D-ro Jacques Boulogne, villa Clarté,
route des Alpes, *Aix-en-Provence* (Poŝtkonto
25.26-88, *Marseille*).
- Germanujo Inĝ. R. Haferkorn, Königsseer Str.
50/o, (13b), *Berchtesgaden*, (Germanujo okci-
denta).
- Hispanujo: D-ro D. Llorens, Calle Caballeros 9,
Valencia.
- Italujo: P. Marelli, Piazza Napoli 40, *Milano.*
- Japanujo: D-ro Yamazoye, Biokemia Instituto,
Gunma Universitato, Iwagami-tyo, *Maebasi.*
- Jugoslavio: Prof. B. Popoviĉ, Zagrebačka 18, *Sa-
rajevo.*
- Meksikio: Inĝ. A. Luna Cardenas, Ap. Postal 7298,
Mexico 1, D.F.
- Nederlando: D-do G. F. Makkink, Eekhoornlaan
10, *Bennekom.*
- Norvegujo: C. Støp-Bowitz, Stensgate 22b, *Oslo*
N.V.
- Nov-Zelando: Prof. C. J. Adcock, Victoria Univ.
College, Box 196, *Wellington.*
- Pollando: D-ro A. Grebecki, Dusznička 63, *Var-
sowio 90.*
- Sovetunio: S-ro J. Ĥoves, poŝtfako 1004 (Espe-
ranto), *Moskvo.*
- Svedujo: Inĝ. S. Alexandersson, Parkvägen 4,
Tumba.
- Urugvajo: D-ro R. Zeballos Morales, *Fray Marcos*
(*Florida*).
- Usono: J. H. Gamble, 6 Lexington Avenue, *Beth-
page*, Long Island (N.Y.).